
## Krucenigmo



Horizontale:

1. tiel kolora estas la medalo de gajninto. 4. fari iu ajn 6. frukto 7. persona pronomo 8. prepozicio 10. dom-best' 13. tabulludo 14. material' konduktanta elektran kurenton 15. rimedo por pagi

Vertikale:

1. narkota substabco 2. ĉiu part' de teatra verko 3. ŝatata hom' 5. granda migrobird' 8. ejo por bestoj 9. ĥemia elemento (halogeno) 11. laŭ Biblio la unua hom' 12. aroma trinkaĵo

*Solvo de la enigmo el la maja numero:*

| | avo | patro | patrino | filo | filino |
|---|---|---|---|---|---|
| nomo | Karlo | Petro | Janino | Alko | Ino |
| partopreno | fervojo | diskuto | poetoj | konc. | ekskur |
| trinkas | kafo | biero | akvo | limo | lakto |
| fruktoj | pomo | banano | ananaso | orango | vinbero |
| amiko el | BR | PL | JP | RU | IT |

*La ekskurson partoprenos la filino Ino kaj la rusan amikon trovis la filo Alko.*

**Konontaktu nin!** **Gun.Eb@t-online.de** **+493831 490003**

Mi nun havas novan adreson!

Gunter Ebert, Straße am Sund 1, D 18445 Kramerhof



# Stralsundaj frekvencoj

**Per Esperanto por popolkomprenigo**

**jaro 2005** **julio**

## *Pri la surtera idealo*

Surtera idealo –
jen sur la dors' de ĉevalo,
en via korpa bonstato
kaj amikina korbato.

*laŭ Friedrich von Bodenstedt*

Ĉu vi sciis,

ke la 27a de junio, la tago de „Sepdormuloj", laŭ ties veter-prognozo en la popolkredo evoluiĝos la venontaj sep semajnoj, origine havas radikojn en la kristana mitologio? Ĝi estas memortago al sep martiroj, kiuj laŭ legendo estis enmasonitaj kaj travivis dormante dum 200 jaroj.

En la meteorologio oni parolas pri destinotagoj, kiuj laŭ popolkredo havas influon al la venonta vetero. La "Sepdormuloj"-tago estas unu el 84 en la kalendaro.

## *La 27a turisma renkontiĝo ĈEP nun estas pasinteco kaj ĝi okazis dum belega somera vetero.*

Jen kelkaj eltiroj el mia taglibro:

**15. de junio**

18:00
- Alveno en Mielno
  La inaŭguro jam okazas, kantas ensemblo de junaj homoj en pola lingvo kaj Esperanto.

**16. de junio**

13:45
- Unua konatiĝo kun la marakvo - mallonga baniĝo.
  La temperaturoj estas ĉ. 11 -12°C. Mi restas nur kelkajn minutojn.

16:00
- Komuna kantado; ni decidas komence nur kanti malnovajn kantojn, ĉar ankoraŭ ne estas papero por novaj tekstoj.

20:00
- Mi montras mian vidbendon pri UK en Ĉinio.

21:45
- Kelkaj el la partoprenatoj decidas pri nokta promeno laŭ la plaĝo.

**17. de junio**

8:30
- Ekveturo al Koszalin, vizito de du modernaj kirkoj
- Terure, mi denove forgesis mian fotokameron!

20:00
- Okazas mia muzikprelego. Intertempe la salono estas plenplena.

**18. de junio**

20:00
- Galina Gorecka raportas pri sia libro-eldonejo kaj pri sia revuo. Ĉifoje ŝi estas pli bone komprenebla ol en Bad König, ĉar la salono ne estas tiel granda. La aŭskultantoj montras viglan intereson.

**19. de junio**

13:00
- La vetero estas belega, kaj la maro bone ondas. Mi volas preni miajn aĵojn por badado.

18:00
- Okazas amuza tombolo. Ĉiu partoprenanto ricevas malgrandaĵon, kelkaj eĉ valoran prezon. Mi ricevas notlibron kun globskribilo.

20:00
- Galina prelegas pri sia 750-jaraga hejmurbo Köngsberg.

**20. de junio**

12:00
- Estas tempo por sunbaniĝo.

20:00
- Halina kaj mi prezentas nian skeĉon. La spektantoj multe ridas – tio signifas, ni favore estas akceptataj.

**21. de junio**

10:00
- Ni ŝipkrozas en Kołobrzeg. Sekvas piedpromeno laŭ la strando.

20:40
- Estas la demando, ĉu ni rigardu filmon aŭ promenu dum ankoraŭ varma vetero laŭ la marbordo. Oni decidas sin por la dua.

**22 . de junio**

20:00
- Ni multe kantas komune kun Koszalinaj esperantistoj. La stiparo brulas kaj la rostita kolbaso bongustas.

**Gunter**